

Johann Wolfgang von Goethe,  
Bundeslied

1. In allen guten Stunden,  
Erhöht von Lieb und Wein,  
Soll dieses Lied verbunden  
Von uns gesungen sein!  
Uns hält der Gott zusammen,  
Der uns hierher gebracht.  
Erneuert unsre Flammen,  
Er hat sie angefacht.

2. So glühet fröhlich heute,  
Seid recht von Herzen eins!  
Auf, trinkt erneuter Freude  
Dies Glas des echten Weins!  
Auf, in der holden Stunde  
Stoßt an und küsstet treu,  
Bei jedem neuen Bunde,  
Die alten wieder neu!

3. Wer lebt in unserm Kreise,  
Und lebt nicht selig drin?  
Genießt die freie Weise  
Und treuen Brudersinn!  
So bleibt durch alle Zeiten  
Herz Herzen zugekehrt;  
Von keinen Kleinigkeiten  
Wird unser Bund gestört.

4. Uns hat ein Gott gesegnet  
Mit freiem Lebensblick,  
Und alles, was begegnet,  
Erneuert unser Glück.  
Durch Grillen nicht gedränget,  
Verknickt sich keine Lust;  
Durch Zieren nicht geengnet,  
Schlägt freier unsre Brust.

...

Johann Wolfgang von Goethe,  
Liga kanto

*tradukita de Ludwig Emil Meier*

1. Dum ĉiuj bonaj horoj  
Kun amo, bona vin',  
Eksonu el la koroj  
La kanto en kazin'!  
Kuntenas nin ja Dio,  
Nin kunvenigis li,  
Pro tio harmonio  
Ne mortos tie ĉi!

2. Do ĝoju kun kontento  
Unuanimaj ni!  
Denove en momento  
De kora simpati'!  
Tintigu tuj la glason  
Kun tia bona vin',  
Ne zorgu, nian kason  
Prizorgos la destin'.

3. Ĉu iri en la rondo  
Ne restas kun plezur'?  
Konservas ni en mondo  
L'emblemon de natur'!  
Por ĉiam niaj koroj  
interkonsentu, kaj  
Pro malserenaj horoj  
Ne ĉesu nia gaj'!

4. Nin Dio benis, vere,  
Liberaj sentas ni,  
Pro iu sperto tere  
Nur kreskas energi'.  
Malhelpos ne kaprico  
Nek ŝajno de afekt',  
Nin ĉiujn, laŭ la vico,  
Imponos nur korekt'!

...

5. Mit jedem Schritt wird weiter  
 Die rasche Lebensbahn,  
 Und heiter, immer heiter  
 Steigt unser Blick hinan.  
 Uns wird es nimmer bange,  
 Wenn alles steigt und fällt,  
 Und bleiben lange, lange!  
 Auf ewig so gesellt.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22).*

*Arg-86-171 (2003-11-10 08:21:52)*

5. Post ĉiu pašo nova  
 Klariĝas viva sort':  
 L'unua estas prova,  
 La lasta estas mort'.  
 Sed ne do timo iel  
 Malserenigos nin,  
 Fidelaj ĉiam kiel  
 Nin kreis la destin'!

*Traduko de la Germana poemo “Bundeslied” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (\*1847-02-16 – †1919) en 1907.*

*Arg-86-172 (2004-09-06 05:32:34)*

*Tiu ĉi traduko troviĝas en la kantlibro “Esperantista Kantaro”, kiu enhavas tradukojn de germanaj kantoj. La tradukoj estas faritaj de Ludwig Emil Meier. La libro estas eldonita en 1907 de Hans Theodor Hoffmann (Steglitzer Str. 44, Berlin, Germanio).*